

# Eŭropa Bulteno

**Sendependa esperantlingva ret-bulteno  
por informado kaj debato pri Eŭropa Unuiĝo**

---

1an de januaro de 2001. N-ro 11

---

Redaktas:

Umberto Broccatelli - Prezidanto de Euxropa Esperanto-Unio  
Via G. Brodolini 10 I-00139 Roma - Italio  
u.broccatelli@tiscalinet.it, tel./fakso +39-0687135019

"Esperi pri daŭrado de harmonio inter multaj sxtatoj sendependaj kaj malligitaj, tio estus neglekti la unuforman iradon de la homaj okazajxoj kaj kontrauxiri la sperton akumulitan de la tempo" Hamilton, The Federalist

\* \* \* \* \*

Tiu cxi retbulteno konsistas el du partoj: unu estas informilo pri Euxropa Esperanto-Unio (EEU-informilo) kaj pri la euxropa agado de la Esperanto-movado gxenerale; la dua estas libera forumo pri temoj ligitaj al la procezo de euxropa unuigxo kaj al ties rilato kun la celoj de la Esperanto-movado (Euxropa debato). Kiu deziras ricevi gxin, tiu sin anoncu al la ret-adreso <u.broccatelli@tiscalinet.it>; same se oni ne plu deziras ricevi gxin. Al la sama adreso oni sendu kontribuojn kaj reagojn. Dankon pro via atento

## EEU - INFORMILO

Post Roterdamo

Kvankam ĝi estas jam aliloke aperinta, ni donas la jenan UEA-komunikon.

### AGANTOJ POR ESPERANTO EN EŬROPO INTERKONSILIĜIS

Laŭ invito de UEA dek-kvino da elstaraj agantoj por Esperanto en Eŭropo, precipe ĉe la instancoj de Eŭropa Unio, kunvenis en Roterdamo la 25-an kaj 26-an de novembro por klopodi kunordigi la plurajn iniciatojn, kiuj okazas en ĉi tiu kampo. La ĉefaj priparolitaj temoj estis la agado de Eŭropa Esperanto-Unio, la agado de la brusela Laborgrupo pri la Lingva Problemo en EU (tute aparte la projekto Neighbour), la partopreno de esperantistoj en la Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001, kaj ebla starigo de Esperanto-oficejo en Bruselo. Multaj ideoj kaj agad-direktoj estis funde analizitaj. Tio helpis ekkompreni la celojn de la malsamaj agantoj, kio estas nepre kondiĉo por kunordiĝi kaj subteni unu la aliajn, anstataŭ konfuzi eŭropajn esperantistojn per kontraŭdiraj mesaĝoj kaj iniciatoj. La planoj por la Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001 antaŭeniras relative kontentige. La esperantistaro ricevos baldaŭ pliajn informojn pri ĝi per apartaj komunikoj. La projekto Neighbour troviĝas nun en

reprezenta fazo. Ĝi akiras trajtojn de scienca projekto, kies realigado devos esti en la manoj de ne-esperantistaj sciencistoj kaj de la eŭropaj instancoj. Komenciĝis la esplorado de la eblecoj trovi en Bruselo taŭgan ejon kaj precipe taŭgan deĵoranton por oficejo, kies labor-enhavo restas ankoraŭ pli precize difinenda. Pri Eŭropa Esperanto-Unio estis prezentitaj ideoj por doni al ĝi pli da forto en la kampoj de reprezenteco de la eŭropaj esperantistoj, firma kunligo kun la landaj asocioj en EU kaj agad-kapablo ĝenerale. Ĉiuj diskutitaj ideoj trovas konkretigon en la venonta periodo, tiel ke oni povas rigardi al la ĵusa kunveno kiel al promesoplana etapo sur la vojo al pli efika agado por Esperanto en Eŭropo. La kunveno rekonfirmis la utilon de konsultiĝoj pri specifaj laborkampoj kaj la oportunecon okazigi tiajn lige kun la Malferma Tago de la CO. Unuafoje oni spertis tion en novembro 1999, kiam UEA invitis al simila kunsido lingvopolitikajn fakulojn (UEA). Post la roterdama kunveno plu daŭris interŝanĝado de informoj kaj opinioj, per e-poŝto, inter estraranoj de EEU kaj aliaj aktivuloj precipe por klopodi alveni al difino de la eblecoj starigi en Bruselo Oficejon de EEU, kun partatempe deĵoranto. Oni starigos "Bruselan Kerngrupon", kun la tasko okupiĝi pri tiu ĉi problemo.

### AKTIVULO SERĈATA POR EEU

EEU - Eŭropa Esperanto-Unio konscias pri la graveco de la esperantista labor-kampo "interlingvistiko - socilingvistiko - lingva politiko". Informado al neesperantistoj laborantaj en tiuj kampoj kaj seriozaj kontaktoj kun ili povas helpi ĝuste informi tiujn, kiuj poste informas la publikon kaj la politikistojn. En la landoj de EEU (krom en kelkaj) apenaŭ ekzistas tia sistema agado. EEU taksas grava la ekziston en ĉiu EU-lando de centro, kiu agu plurnivele sur la scienca kampo, kunlabore kun la landaj asocioj kaj eventuale kun landaj neesperantistaj lingvistaj aŭ similaj asocioj. Aliflanke en multaj EU-landoj ekzistas elstaraj individuoj agantaj en tiu kampo, kiujn oni kunligu, kaj al kiuj oni liveru informojn pri la ekzistantaj sciencaj materialoj pri Esperanto aŭ pri Esperanto, kunlige kun socilingvistiko kaj lingva politiko. Se vi pensas, ke vi estas la taŭga komisiito de EEU por komenci tian agadon, bonvolu anonci vin ĉe la prezidanto de EEU, Umberto Broccatelli u.broccatelli@tiscalinet.it aŭ ĉe mi corsetti@itelcad.it

### GERMAIN PIRLOT TRANSDONAS SIAN TORĈON AL CLAUDE LONGUE EPÉE

De multaj jaroj nia belga amiko Germain Pirlot kolektas deklarojn de eŭropaj parlamentanoj, kiuj esprimis ian simpatian aŭ almenaŭ ne-kontraŭecon al Esperanto. Listo de la nomoj de tiuj "simpatiantoj" regule aperadis, ĝisdatigite. Tia laboro ne povas esti tasko de unu sola homo, kaj fakte li ricevis kunlaboron de kelkaj, sed ne multaj, diverslandajn helpantojn. Nun por atingi pli bonan kunordigon de tiu laboro, ĝi estas transdonita al la franca EEU-komitato Claude Longue-Epée, kun kiu Pirlot tamen plu kunlaboros. Al ambaŭ iru nian koran dankon.

### CLAUDE LONGUE-EPÉE SIN PREZENTAS PER TIU ĈI LETERO AL LA EEU-AKTIVULOJ

Karaj Geamikoj,

Vi ricevis mesaĝon de nia amiko Germain Pirlot. Li asertas, ke ĝi estas lia lasta mesaĝo; sed ni ĉiuj esperu, ke ni havos pliajn Pirlot-ajn mesaĝojn kaj kontaktojn, por ke li ofte konsilu kaj gvidu nian komunan agadon. Germain Pirlot avertis vin, ke mi ja provos alpreni la torĉon, kiun li portis efike dum pluraj jaroj, kaj kiu certe estas malfacile portebla... Mi do estas Claude Longue-Epée, 70-jara eksingenero pri termiko kaj sukerfarado, fanatika biciklanto. Mi kapablas preskaŭ taŭge esprimi min franclingve kaj esperante

(kaj ankaŭ en la pikarda dialekto). Mi estas membro de la estraro de la franca landa asocio UFE, kaj komitatano de EEU, kaj de du jaroj zorganto kun vi ĉe la Eŭropaj Parlamentanoj. Mia relativa najbareco de Bruselo ebligas, ke mi faras oftajn vojaĝojn al la parlamentejo. Germain Pirlot en sia mesaĝo skribas ankaŭ, ke mi klarigos al vi "mian strategion". Fakte, tiu strategio estas apriore simpla : Se vi konsentas, mi sugestas, ke :

1- Ni daŭrigu la Pirlot-an strategion. Tio signifas daŭrigi la inform-kampanjon, kiun ni aktive partoprenis ĝis nun. Tio signifas daŭre informi niajn naciajn eŭropeputitojn pri ĉio koncernanta esperanton (ne nur en Eŭropa Unio aŭ tuta Eŭropo). Pri ĝiaj karakterizoj de komunikilo, de lingva propedeŭtiko, de ilo al la interkomunikado kaj al la paco. Pri ĝiaj kelkfojaj sukcesoj kaj oftaj malfacilaĵoj fronte (aŭ helpe) al la plurlingveco kaj kultura diverseco (prikantitaj de la eŭropaj instancoj, sed ofte kontraŭvunditaj de la samaj instancoj). Tio signifas ankaŭ sciigi ĉiun el ni (tra mia perado kaj ĉefe tra la perado de interreto) pri niaj specifaj agadoj kaj interŝanĝoj de leteroj, laŭdoj aŭ insultoj kun niaj eŭropaj parlamentanoj.

2- Ni kompreneble evoluigu kaj pliampleksigu la liston de niaj deputitoj, kiuj sin deklaras oficiale favoraj al esperanto kaj al ĝia eŭropa promocio. Tiu listo ne ŝanĝiĝis de post novembro. Sed estas permesate peti novjaran donacon de niaj demokratie elektitaj reprezentantoj!...

3- Ni agadu en intimaj rilatoj kun EEU kaj kun ties landaj reprezentantoj, kaj subtenu ties eŭropekalajn kampanjojn. Kaj, se necese, ni estu la perantoj inter niaj EEU-komitatanoj, niaj landaj esperanto-asocioj, niaj eŭropparlamentanoj. Inter tiuj EEU-kampanjoj, estas la kampanjo por "Deklaro por Konstanta Konferenco pri la eŭropa problemo de la lingvoj". Kaj ne estas tro malfrue por informi kaj instigi la esperantofavorajn deputitojn subskribi la tiurilatan peticion, kiu povas havi almenaŭ la meriton ilin konservi en mobilizo.

4- Ni konservu kiel eble plej bonan farton dum la tuta venonta jaro kaj la postvenontaj, por daŭrigi obstine kaj efike nian agadon.

Ĉiukaze tio estas mia sincera deziro. Mi sendas kromajn bondezirojn, al vi mem, viaj familioj kaj viaj amikaroj, por feliĉo, prospero kaj sukceso en viaj entreprenoj, por la nova jaro... Kaj mi profitas tiun favoran eŭforian jarŝanĝan periodon, por rekomendi, ke vi ne hezitu sciigi al mi viajn rimarkojn, kritikojn kaj sugestojn.

Samideane via  
Claude Longue-Épée.

#### INFORMO DISKONIGINDA AL LA NACILINGVAJ GAZETAROJ

Diplomata konferenco en Munĥeno adoptis la 29an novembro, amendojn pri la Eŭropa Patento- Traktato. Laŭ la nova Traktato, kiun parlamentoj en membro-ŝtatoj adoptu ĝis 1an septembro 2001, patentoj estu publikigitaj aŭ tradukitaj aŭ anglen, aŭ germanen kaj francen. Ne plu necesos por ŝtatoj peti tradukon nacilingven. Ankaŭ ne plu necesos ke usonaj kaj anglaj firmaoj traduku francen aŭ germanen. La ŝanĝoj fakte signifos ke la angla estos la nura patento-lingvo por la plejparto de eŭropaj ŝtatoj (ankaŭ en orienta Eŭropo). Samtempe en Usono validis je la fino de novembro leĝo, laŭ kiu fremdaj patentoj ne plu ĝuas je tuja leĝa protektado, se ili ne estas en la angla. Baldaŭ la plejparto de eŭropaj firmaoj pagos pli por eŭropa patento ol usonaj kaj anglaj firmaoj.

\*\*\*\*\*

## EŬROPA DEBATO

### ANKAŬ ESPERANTISTOJ MANIFESTACIIS EN NICO

La gazetoj kaj la televidoj abunde montris la manifestaciojn okazintajn en Nico dum la Eŭropunia "Suprokonveno" (aŭ Interregistara Konferenco), fare de la partoprenantoj en la "kontraŭ-supro" "Attac", kiuj protestis kontraŭ tutmondiĝo kaj kontraŭ eŭropa Unuiĝo, laŭ tre bruaj kaj rompaj metodoj, ne zorgante aŭ eĉ ne konsciante pri la kontraŭdireco de tia manifestaciado. Unuflanke oni protestis - forte kaj perforte - kontraŭ liberala tutmondiĝo mastrata de Usono kaj malzorganta la socialajn kostojn de la procezo, kaj aliflanke oni defendis la naciŝtatajn rajtojn kaj ekskluzivemojn kaj la ekonomiajn protektismojn, kiuj malebligas konstruon de eŭropa kontraŭpezo al Usono kaj starigon de tuteŭropaj socialaj reguloj. Samtempe la amasinformiloj tre malmulte (aŭ eĉ tute ne) informis pri alia manifestacio, okazinta en Nico la 7an de decembro, kun partopreno de ĉirkaŭ dek mil homoj, 230 standardoj de komunumoj kaj provincoj, tridek eŭropaj parlamentanoj, du kilometroj da defilado, festa kaj bunta etoso, finaj paroladoj de la eŭroparlamentanoj kaj de aliaj politikistoj. En tiu manifestacio partoprenis grupeto da esperantistoj el kelkaj norditalaj urboj (Torino, Bergamo, Verona, Bologna), kiuj montris la esperantan flagon kaj esperantajn slogantukojn. En raporto de la sekretario de la Bolonja sekcio de la Eŭropa Federista Movado (MFE) oni diras interalie la jeno. "Preter la obskurigo farita de la amaskomunikiloj mi povas tamen diri kun certeco ke la organizado de la manifestacio ebligis al ni renkonti dumvoje geamikojn apartenantajn ankaŭ al aliaj asocioj (inter kiuj la esperantistoj) kaj partioj, kiuj helpis nin en nia laboro, kaj mi estas konvinkita ke ili same faros en la estonto. Ĉi tie mi ankoraŭfoje dankas ilin."

Jen dokumento de la Nacia Estraro de MFE pri Nico. La Eŭropa federista Movado konsideras la Nican Traktaton kiel tute neadekvatan por alfronti la problemojn de Eŭropo: t.e. la plilarĝiĝo, la regado pri la Eŭro kaj la nova rolo de Eŭropo en la mondo. La Nica Traktato pludaŭrigas la interregistaran metodon bazitan sur la veto-raĵto, eksplicita pri ĉiuj gravaj temoj - kiel impostado kaj ekstera politiko - implicita pri la problemoj, pri kiuj oni decidis transiri al voĉdono laŭ plimulto, ĉar malplimulto el malmultaj landoj povas bloki ĉiun decidon. La interregistara Eŭropo mizere ŝippereis en Nico. Kun la plilarĝiĝo ĝis 27, jam baldaŭ okazonta, ĝia decidkapablo estos definitive kompromitita. La kolapso de la Unio estas nur prokrastita en la tempo. En Nico, la ŝtatestroj kaj registarestroj ne volis alfronti la ununuran problemon decidigan: la kreo de eŭropa registaro legitimita de federacia Konstitucio. Se la komuna intereso de la eŭropanoj ne estas defendata de komuna registaro, estas neeviteble ke la naciaj egoismoj superregu. La maldeca marĉandado de Nico estas nur la preludo de tio, kio okazos en Eŭropo plilarĝigita de Svedio ĝis Rumanio. La Eŭropa Federista Movado petas ke la Eŭropa Parlamento ne voĉdonu la "konforman opini-esprimon" kaj ke la Itala Parlamento ne ratifu la Nican Traktaton manke de klara sindevido al kunvokado de eŭropa konsitucifara Asembleo. (el raporto de Gianfranco Tomba, el la Bolonja Esperanto-Grupo) Mi intencas regule plu aperigi dum la nova jaro kaj la retan version de Eŭropa Bulteno kaj la surpaperan, sendotan al la "EEU-simpatiantoj". Viaj komentoj kaj opinioj estos bonvenaj. Korajn bondezirojn por feliĉaj kaj fruktodonaj jaro, jarcento kaj.. jarmilo. La nepoj nin benos!  
U. Br.

u.broccatelli@tiscalinet.it  
u.broccatelli@libero.it

Umberto Broccatelli - Via G. Brodolini, 10 - 00139 Roma  
Redaktoro de "l'esperanto", organo de Itala E-Federacio  
Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio